# La spiriteco kiel faktoro de ekologia medio

V. I. KISELEV (TJ)

La homaro en sia historia evoluo traspasas diversajn formojn de sia soci-ekonomia stato, kiuj nomiĝas soci-ekonomiaj formacioj. Al ĉiu soci-ekonomia formacio, aŭ ĝenerale al ĉiu formo, ĉiu ŝtupo de soci-ekonomia progreso, respondas ĝia formo, ĝia ŝtupo de civilizacio. Se la formo de soci-ekonomia formacio karakterizas certan modon de industria produktado kaj de respondaj al ĝi soci-politikaj kaj ideologiaj interrilatoj, la ŝtupo de ligita kun ĝi civilizacio karakterizas la nivelon de socia evoluo determinitan de la nivelo de evoluo de produktivaj fortoj kaj reflektitan en materia kaj spirita kulturo de socio. Do, en la nocio "civilizacio" reflektiĝas du flankoj de socia evoluo: la nivelo de industria progreso kaj la nivelo de spirita kaj materia kulturo. La homara sperto montras, ke tute ne ĉiam, ne en ĉiu ŝtupo de civilizacio tiuj ĉi du ĝiaj flankoj troviĝis en harmonia ekvilibro: plejparte unu el ili dominas super la alia. Jen tiel, ni vidas en la homara historio ĉu la ekzemplojn de la domino de kultura konsistaĵo super la industria (mezepokaj Centro Amerikaj civilizacioj), ĉu la tute malajn kun la domino de industria komponento super la kultura (civilizacio de evoluinta kapitalisma formacio). La unua okazo prezentas sin kiel pli stabila sistemo por evoluo de homa socio, ĉar ĉe tiuj kondiĉoj, kiam la kulturo determinas kaj movas teĥnikan progreson, neniam povas rezulti la difektiĝo de ĉirkaŭanta medio, neniam povas suferi la naturo (pro la internaj kaŭzoj). La dua okazo prezentas sin kiel tute malstabila sistemo kun detruigaj postsekvoj por entenanta natura medio. Ni analizu pli detale tiujn ĉi ambaŭ okazojn.

Por la unua okazo, kiam en iu civilizacio dominas la kultura konsistaĵo super la industria, la danĝero venas nur elekstere, ĉe la influo de iu alia civilizacio havanta pli altan ŝtupon de evoluo. Tiuokaze efektiviĝas la abunda transpreno de modernaj industriaĵoj el la dua civilizacio far la unua, pro kio neeviteble suferas la kulturo de tiu lasta, ĉar ĝi ne estas ankoraŭ preta por organike transpreni novajn valoraĵojn. Sekve de tio la propra kulturo regresas, samtempe perdiĝas la estintaj normalaj interrilatoj kun ĉirkaŭanta medio. Tiu popolo, kies



kulturo regresas, jam ne kapablas protekti sian ekologian medion, ĉar la postuloj de la nova, "pli supera", civilizacio strebanta kontentigi siajn bezonojn, rabe liverante al si pli kaj pli da krudaĵo, igas ignori la originan vivmanieron kaj rompi la delonge stabiliĝintajn ligojn kun la naturo.

Por la dua okazo, kiam en iu civilizacio dominas la industria komponento super la kultura, la danĝero venas elinterne - de sia propra nekonscio en la uzado de modernaj inventaĵoj baziĝanta sur la malantaunivela kultura konscieco. Tre negativaj postsekvoj observeblas kiam la amaso da teĥnikiloj fariĝas atingeblaj kaj uzeblaj far la malbone edukita socia plimulto, ĉar senscieca uzado de modernaj teĥnikiloj far la manoj de kulture malkleraj "specialistoj" rekte kondukas al la rompiĝo de natura ekvilibro, difektiĝo de ekologia medio.

Ambaŭokaze estas videble, ke antaŭ la detruiĝo de ekologia medio nepre komencas suferi la kulturoj ĉu de indiĝenaj popoloj sub la premo de "pli altnivelaj" industriaj civilizacioj, ĉu de popoloj posedantaj tiujn civilizaciojn. Pro kio komenciĝas tiu ĉi sufero de la kulturoj? Pro la perdo de la plej grava, plej esenca eco de ĉiu ajn kulturo, kiu nomiĝas spiriteco. La spiriteco estas prikonscio, far persono aŭ socio, de la tuta kreiva heredaĵo, spirita kaj materia, kolektita de antaŭaj generacioj, naskanta inspirajn fortojn por strebi al plua perfektiĝo, permesanta senti sian valoron kaj integran lokon en la tutmonda kulturo. La spiriteco estas animo de ĉiu ajn kulturo.Perdo de la spiriteco signifas senviviĝon de la kulturo, ĝian transformiĝon je morta ŝemo, je kadavro fatale disfalanta kaj putriĝanta.

Kiam okazas la perdo de spiriteco?Ĝuste tiam, kiam rompiĝas la ekvilibro inter la kultura kaj industria flankoj de civilizacio. Kio estas observebla tiuokaze?

Se iu civilizacio estas influata de la alia kun pli alta industria nivelo, tiam nepre okazas, kio jam estas dirite, la intensa kaj spontana elpreno de novaj valoraĵoj por egaliĝi kun nova ŝtupo de civilizacio. Sed se la distanco inter ambaŭ civilizacioj estas sufiĉe granda, tiuj ĉi novaj valoraĵoj ne povas esti dece prikonsciitaj kaj adoptitaj en originan kulturon. Ili enportas nur la detruantan efikon al la nekongrua grundo de la malnova sistemo de tradicioj, moroj, kutimoj. Anstataŭ la vera adopto efektiviĝas nur supraĵa adaptiĝo, kaj tiu adaptiĝo fakte estas

nur ŝajna adopto. Estiĝas la papaga sindromo: anstataŭ la organika absorbo de nova vivmaniero kun novaj kulturaj valoraĵoj okazas nur imito de tiuj. La strebo al novaĵoj ebligas la ignoron de malnovaj valoraĵoj, la ofta ignoro ebligas la forgeson, kun la forgeso perdiĝas la radikoj de la malnova kulturo, do jen rezulte estas la perdo de spiriteco. Aliflanke, la nekapablo kompreni novajn valoraĵojn kaj dece adopti ilin estigas la surdan inciton kontraŭ la nekompreneblaĵoj kaj tre ofte provokas la eksplodojn de vandalismo, pro kio oni vidas, ekzemple, rompitajn telefon-aŭtomatojn, frakasitajn elektrolampojn kaj magazenvitrinojn, difektitajn maŝinojn k.t.p. La perdo de spiriteco pro la disfalo de origina kulturo elnaskas la sovaĝecon kontraŭ la valoraĵoj de la nova kulturo, malgraŭ tio ke tiu lasta estas imitata. Kaj plie, la perdo de spiriteco pro la disfalo de la origina kulturo rompas ĝiajn naturajn ligojn kun la ĉirkaŭanta medio, kiuj antaŭe estis gardataj kaj prizorgataj. El tiu rompiĝo rezultas la ĉeso de protektado de natura medio kun la postsekva difektiĝo de ekologia ekvilibro.

Se iu civilizacio bonorde progresas en sia industria evoluo, povas okazi tiel, ke la strebo al plua industria perfektiĝo lasas malantaŭe la necesan por tio nivelon de kultura kohereco. El iu parto de socio formiĝas ia elito okupiĝanta pri la teĥnika progreso, kiu tre longdistance postlasas malantaŭ si la ordinaran popolan amason, forgesante necesmaniere eduki ĝin por ke ĝi povu dece akcepti novajn teĥnikajn valoraĵojn. Sed la ignoro de neceso de kultura evoluigo de la tuta popolo kondukas al tiu stato, ke la strebo al teĥnika perfektigo ĉe unu parto de la socio elvokas la malsanan pasion al modernaj teĥnikaĵoj ĉe la alia parto de la socio. Venas la iluzio ke la diversflanka konsumado kaj uzado de teĥnikaĵoj kaj teĥnikiloj montras la respondan nivelon de la nova ŝtupo de kulturo. Sed la vera kulturo fakte estas tute forgesata: oranĝeriaj kondiĉoj de blinda utiligo de teĥnikaj atingoj elpremas veran kulturon, kaj la konsumantoj de tiuj bonoj plene perdas iun ajn kapablon ekkonscii la novajn kulturajn bezonojn. Kaj en rezulto, kun la perdo de tiu kompreno denove perdiĝas la spiriteco de homa socio.

Kun la perdo de spiriteco la homa socio diverĝas je kelkaj tavoloj. Unu tavolo prezentas per si la malkleran kaj misedukitan parton de la socio. Certe, tiu ĉi parto estas iasence iel edukita, sed ne el kultura vidpunkto. Laŭ konsidero de tiu ĉi lasta, ĝi estas praktike plene



sovaĝiĝinta: memoru tiujn individuojn aspektantajn moderne vestitaj, promenantaj kun luksaj magnetofonoj enmane, havantajn tre modajn motorciklojn aŭ aŭtojn k.t.p, sed kun malklaraj bovsimilaj okuloj esprimantaj neniun homan senton. Iliaj karakteraj trajtoj estas la agresema senscieco kun senlima sintrotakso, senceremonia malestimo de aliaj homoj, malsaneca opinio pri la graveco de sia persono. Ĉiuj vidis ilian konduton: ili povas tute senkaŭze ofendi, insulti feblulojn, aroge ĝeni aliajn homojn per bruo, per laŭta muziko, per aŭto sub la fenestro, per maldeca insultaĵo, per malpurigado de publikaj lokoj k.t.p. En la socia vivo ili estas nur manĝantoj de fruktoj de scienc-teĥnika progreso, nenion mem produktantaj, vivantaj ĝuste kiel parazitoj, lasante post si nur malpuraĵojn. La vivcelo de tiuj homtipoj estas nur konsumado de manĝaĵoj, certe nur bonkvalitaj, de modernaj industriaj varoj, de aliaj produktaĵoj kaj komfortaĵoj de la progreso, akompanante tion de la ricevo de plezuroj. La pinto de la plezurkonsumado estas, verŝajne, tiu stultiĝo, kiu observeblas dum la amasaj rok-koncertoj, kiam la tuta "plezuriĝanta" publiko fakte animaliĝas. Tiuj ĉi okazintaĵoj klare montras la senduban regreson de tiu ĉi tavolo de la socio el la kultura vidpunkto, plenan perdon de spiriteco, ĉar kia povas esti spiriteco ĉe animaloj? La postsekvoj de tiu senspiriteco estas nepre detruaj: kaj ne nur por la socio mem, sed ankaŭ por la naturo, ĉar la animaliĝintaj homoj kapablas nur difekti ĉion, sed ne krei. Neniu estas pli danĝera ĉu por la socio, ĉu por la naturo, ol la teĥnike ekipita senscieco. Nur tiu ago povas esti kreiva, kiu baziĝas sur moraleco kaj spiriteco - tiuj ĉi neapartigeblaj ecoj de la kulturo.

Alia tavolo de homa socio karakteriziĝanta pro manko de spiriteco estas la nuntempa t.n. teĥnike klerigita intelektularo. Ĝi aperas pro neretenebla strebo de la socio al la teĥnika progreso, kiam dum la preparo de siaj specialistoj oni edukas ilin nur unuflanke, dediĉante la tutan tempon al teĥnikaj sciencoj kaj tute ignorante kulturan edukadon. Ĝuste pro tio elkreskas tiaj specialistoj, kiuj tute ne kapablas eksenti, percepti kaj estimi la ĉirkaŭantan kulturan medion jam ekzistantan dum multaj jarmiloj, kaj ĝuste pro tio ili ne kapablas kompreni valoron de la natura medio por dece protekti kaj gardi ĝin. Ĉu povas efektivigi la decan protekton de la naturo tiuj "konstruantoj de la futuro", kiuj estis jam denaske sugestitaj ke "la homo pasas kiel

mastro de la vasta patrujo sia" kaj poste, dum la studado, armiĝintaj de la slogano "ni ne povas atendi almozojn de la naturo, preni ilin de ĝi estas nia tasko"? Laŭ sia edukiteco ili povas esti nur tiaj, kiuj neniigis la tutan konstruuzeblan arbaron en la Eŭropa parto de Rusio kaj la tutan fiŝaron en ĉiuj akvujoj, difektis la riveron Volga kaj humon en la tuta teritorio de Ruslando, mortigis Aralan maron kaj alkondukis al la eko de katastrofo jam Nigran Maron, konstruis la digon sur la gorĝo de la golfo Kara-Bogaz-gol kaj strebis turni la fluejojn de nordaj riveroj suden, ili ankoraŭ hodiaŭ sukcese daŭrigas pereigi la tundron, malpurigi Bajkalon kaj venenigi riverajn akvojn per urbaj kaj industriaj kotaĵoj. Ĉu ĉion ĉi postulas nia ekonomiko? Certe ne! Ĉion ĉi ebligas nur la kultura nivelo de difekte edukitaj "intelektuloj" asociiĝinta ĉe ili sole kun uzado de televidilo kaj videomagnetofono kaj tute senigita de tiu nocio kiel spiriteco, ĉar en la kulturo ili vidas nur la rimedon por distri kaj amuziĝi.

La manko de kulturo, foresto de spiriteco reflektiĝas ne nur en la detruaj agoj por ĉirkaŭanta medio, sed en la industria procedo mem: la senspiriteco naskas koheran rilaton ankaŭ al la produktoj de sia peno, al la maniero labori mem. La labora proceso degeneras, kaj rezultiĝas tio, kio nomiĝas la manko de teĥnologia kulturo. Ĝuste pro tio oni havas la malaltkvalitajn varojn, malbone konstruitajn domojn, malzorge faritajn maŝinojn k.t.p. La neglekto al sia peno ebligas la malstreĉitecon, sendevigecon kaj nedisciplinemon. Kaj kiel la sekvoj de tiuj ecoj okazas diversaj averioj en uzinoj, eksplodoj kaj fervoj-, aer-, marinkatastrofoj, kaj fine - tiaj eventoj kiel Ĉernobil.

La teĥnologia kulturo kaŭzas siavice la mankon de ekologia kulturo ĝenerale, ĉar la malperfekta teĥnologia kulturo ne nur rekte difektas la naturon, sed ankaŭ elformas respondan rilaton al la naturo deflanke de la portantoj de tiu teĥnologio. La neglekto al teĥnologia proceso ellaboras la neglekton al ĉirkaŭanta medio. Ĉio ĉi estas firme ligita.

Do, kiel videblas el la suprediritaj rezonoj, estas klare evidentaj la jenaj kaŭzo-sekvaj ligoj: spirita kulturo - teĥnologia (industria) kulturo - ekologia kulturo. La difektita spirita kulturo kaŭzas la analogan teĥnologian kulturon, kaj tiu lasta - la respondan al si ekologian kulturon. Alivorte, en la bazo de ekologia stato de ĉirkaŭanta medio, kiel ĝia fundamento, ĝia radiko, kuŝas la nivelo de spiriteco de la



homa socio. Do, la spiriteco estas la faktoro de ekologio, t.e. la faktoro determinanta la ekologion. La ekologia stato de ĉirkaŭanta medio en nuna tempo dependas nur de la homa agado. Se tiu agado baziĝas sur la dum multaj jarmiloj ellaborita spiriteco, sur la racia ekvilibro de kultura heredeco kun teĥnikaj atingoj, rezultas la harmonia homa socio kun alta nivelo de moraleco. En tiuj kondiĉoj neniam suferas la naturo, neniam difektiĝas la ekologia medio. La tute mala efiko observeblas ĉe la manko de spiriteco en homa socio, tiam nepre okazas la fenomeno de ne nur malsana socio, sed ankaŭ, kiel postsekvo, de suferanta naturo, de difektita ekologio.

Pri tio, ke la spiriteco de homa socio estas la faktoro determinanta la ekologian staton de ĉirkaŭanta medio, oni povas konvinkiĝi ekkonante la evidentan empirian laŭleĝecon: ju pli mankas la spiriteco en la socio, des pli malbonan ekologian staton havas la ĉirkaŭanta medio. Per la viruso de senspiriteco, kaj responde de malbonigo de ĉirkaŭanta medio, estas infektitaj praktike ĉiuj landoj en la mondo. La plej kontentigan staton laŭ tiu faktoro havas la plej evoluintaj landoj de Eŭropo, Ameriko kaj Orienta Azio kaj ankaŭ, kontraste, la malplej evoluintaj regionoj de Afriko kaj Pacifiko, kies popoloj ankoraŭ ne estas rimarkeble tuŝitaj de la nuntempa civilizacio. Tiu ĉi ŝajne stranga polareco estas facile komprenebla: en la plej evoluintaj landoj oni sukcesis maksimume alproksimiĝi al tiu harmonia ekvilibro inter la kultura nivelo kaj industria progreso, kiam la kultura nivelo, kaj responde la spiriteco de loĝantaro, ne postrestas sufiĉe longdistance de la industria evoluo; la samo okazas en la malplej evoluintaj landoj, kie la loka origina kulturo ankoraŭ normale harmonias kun la vivmaniero de loka loĝantaro en ĉirkaŭanta medio, kiam la influo de fremda civilizacio ankoraŭ ne estas sufiĉe sentebla.La malplej kontentiga stato laŭ la temata faktoro observeblas en tiuj landoj, kie la kultura evoluo de ties popoloj, kaj responde ties spiriteco, tre longdistance postsekvas la industrian evoluon de la nuntempa civilizacio. La plej okulfrapan ekzemplon de tiuj landoj demonstras per si la regionoj de eks-Sovetunio, kie konstateblas ĉu regionoj kun evoluinta industrio en la manoj de kulture postrestintaj popoloj, ĉu regionoj influataj de la nuntempa civilizacio kun detruiĝintaj originaj kulturoj. La ekologiaj postsekvoj de tiuj diskongruoj ambaŭokaze estas plorindaj. Kaj la rezultoj de la socia degenero estas identaj: pro

manko de spiriteco oni vivas en la etoso venenigita de agresemo, de malfavoreco, de malkaŝita enviemo, de blasfemado estanta nepra vorta garnaĵo de ĉiuj socitavoloj, de ŝtelado el laborejoj kaj kutime el ĉieloke, de apaĉeco kaj fine de senlima ebrieco transformanta homojn en animalojn - alivorte, la spirita ekologio ankaŭ troviĝas ĉe la limo de pereo.

Ambaŭ ekologiaj statoj de homa vivmedio - ĉu natura, ĉu spirita - estas reciproke influeblaj: sendiskutebla estas tio, ke la kultura nivelo de homa socio ege influas ĝian industrian evoluon, same kiel la industria evoluo favoras la plialtigon de kultura nivelo. La danĝero konsistas nur en tio, ke ne rompiĝu inter ili la kongrua konformeco, ke ne deproksimiĝu la distanco inter ili - ja estas klare kiaj sekvas la rezultoj...

Kiel atingi tiun harmonian kunfunkciadon de ambaŭ flankoj de homa civilizacio? Ni trovos la respondon laŭ la malnova recepto: se estas konata la kaŭzo de malsano, do estas kuracebla la malsano mem. Ni evidentigis ke en la bazo de homa kulturo, de industria kaj de naturprotektado kuŝas la spiriteco de homa socia evoluo, ĉu la ekologian staton de ĉirkaŭanta medio, do la tuta atento devas esti direktata al la kultivado de tiu faktoro. Neniu intensigo, per industriaj rimedoj, korekti la ekologian situacion por savi la difektiĝantan naturon estos efikaj, se tiun korektadon efektivigos kulture misedukitaj homoj, kiuj laŭ sia senspiriteco neeviteble vanigos sian penon. La plialtigo de spirita potencialo, la kreskigo de kultura nivelo devas esti la dominanta adiciato de la homara evoluo. Ne la teĥnika ekiparo, ne la socia industriiĝo devas tiri post si la malantaŭiĝintan kulturon, sed la kulturo mem devas movi, antaŭenpuŝi la teĥnikan progreson. Nur kiam la kulturo fariĝos la motoro de la homara evoluo, tiam ne nur pli perfekte progresos la homa socio mem, sed ankaŭ ĉesos suferi la ĉirkaŭanta medio, ĉar la kultura homo neniel kapablas difekti sian naturan hejmon. Do, nur la spiriteco savos la nunan malsanan socion kaj ĝian medion, nur la racio savos la mondon.

Viktor Ivanoviĉ KISELEV
Instituto geologia de Akademio de Sciencoj de Taĝikio
ul. Razina 5, kv. 1
GUS 734005 DUŜANBE - TAĜIKIO



# Hanibalo, la kartaga militestro

Gerhard KALKHOF (DE)

## 1. La komenca historio de Kartago (814 aK - 509 aK)

Allogis Mediteraneo jam en la frua antikva epoko iujn popolojn, tie navigi, ĉar la situo de ĉi tiu maro inter la kontinentoj Azio, Afriko kaj Eŭropo favorigis la ŝipiradon sen iaj rimedoj (kiel kompaso aŭ sekstanto). La tiamaj ŝipirantaj popoloj orientis sin laŭ la bordolinioj kun ĝiaj promontoroj, aŭ singarde velante, remante de insulo al insulo, ĝuste kiel tio necesis por tranoktado; ĉar la naviguloj ne ŝatis la mallumon sur la maro.

Estis nek egiptoj nek la mezopotamiaj popoloj, kiuj riskis aventurajn ŝipveturojn malgraŭ ilia alta kulturstato, sed semidaj popoloj, rekte lokiĝantaj al la orienta bordo de la maro, precipe en hodiaŭa Libano. Distingiĝis de aliaj popoloj la fenikoj. Elirante de sia ĉefurbo Tiruso (Tyros), ili traveturis ne nur Mediteraneon ĝis ĝia okcidenta fino, sed ankaŭ Atlantikon, velante laŭ la Afrika bordo (ĝis la golfo de Gineo) kaj norden al Britujo; tio okazis jam dum la 12a ĝis la 9a jarcento aK. Ili ja ne kontentiĝis je aventuraj veturadoj, kontraŭe ili persekutis alian celon. Ĉar ili estis lertaj komercistoj, ili serĉis oportune situantajn lokojn, por komerci kun la ĉirkaŭaj popoloj, kaj ĉie ili fondis faktoriojn, tiel al la bordoj de norda Afriko kaj Hispanio, sed ankaŭ sur la insuloj, precipe Sicilio.

Inter ĉiuj tiuj urbaj kaj komercaj establaĵoj unu elstariĝis (krom Tiruso, la origina urbo), fondita verŝajne dum la 8a jarcento en nuna Tunizio, proksime de la ĉefurbo Tunizo. Laŭ legendo ĝin fondis en 814 la reĝidino Dido, forpelita el Tiruso (Arkeologoj fiksas la fondadon je ĉirkaŭ 750 aK.). La "Nova urbo" - tion signifas la fenika nomo Kharthdaŝt - prosperis tiom forte, ke baldaŭ ĝi konkuris kun la grekoj, kiuj ankaŭ navigante kaj komercante strebis al hegemonio en la okcidenta Mediteraneo.

Batalante kun ili alterne en venkado kaj malvenkado, Kartago tie fakte akiris hegemonion, post kiam ĝi konkeris la okcidentan parton de Sicilio kaj la tutan Sardinion (ĉ. 550/40). Aliancante kun la etruskoj, loĝantaj ĉe la okcidenta bordo de meza Italio, Kartago